

Eŭropa Bulteno

Majo 2017, Numero 171

EEU-AKTIVADO EN FREIBURG



EŬROPA KONFERENCO „ZAMENHOF KIEL ANTAŬULO DE HOMAJ RAJTOJ“

La Germanan Esperanto-kongreson enkondukis la 3-an de junio 2017 Eŭropa Konferenco dediĉita al 100-jara datreveno de la morto de Zamenhof, kiun organizis Eŭropa Esperanto-Unio. La konferencon enkondukis per kelkaj vortoj kaj poemo pri Zamenhof de K.Kalocsay la prezidanto de EEU dro Seán Ó Riain kaj prezentis la ĉefan kaj honoran gaston de la konferenco kaj de la kongreso, doktoron Vytenis Andriukaitis, komisionanon de Eŭropa Komisiono pri sano, kiu prezentis la ĉefreferaĵon pri la temo. Vi povas legi ĝin en la sekva kontribuo al la Bulteno. Sekvis la prelego de Ulrich Brandenburg, nova estrarano de EEU, iama ambasadoro de Germanio en kelkaj landoj. La tria preleganto estis Jozefo Reinart, ankaŭ nova estrarano de EEU kaj ankoraŭ aktiva diplomato de Slovakio, kiu parolis pri la ĝisnunaj sukcesoj de poresperanta agado en pasinta kaj ĉi tiu jaro en la viŝegradaj landoj kaj

la perspektivoj. Fine parolis Zlatko Tišljár pri grava potenciala kontribuo de Zamenhof al nuna novkreado de Eŭropa Unio. La du lastaj referaĵoj aperos en la sekva numero de la Bulteno.

Fine de la konferenco Seán Ó Riain invitis d-ron Andriukaitis al la scenejo por solene proklami lin Honora membro de EEU. Li iĝis la 8-a honora membro.

Zlatko Tišljár

PAROLADO DE KOMISIONANO VYTENIS ANDRIUKAITIS »Zamenhof – antaŭulo de homaj rajtoj«



Mi volas danki al ĉi-tiu komuna konferenco de la Eŭropa Esperanto-Unio kaj la Germana Esperanto-Asocio por la invito partopreni.

Ĉi-jare ni festas la centjariĝon de la morto de d-ro Ludoviko Zamenhof, pensulo, poeto kaj viziulo, la iniciatinto de Esperanto, kiu estis agnoskita de UNESKO en 1959 kiel "*unu el la grandaj personecoj de la homaro*". Esperanto nun aĝas 130 jarojn kaj estas

en ĉiutaga uzo en pli ol 120 landoj, kaj estas pli ol 1.500 stratoj tra la mondo kiuj nomiĝas "Esperanto" aŭ "Zamenhof". Kiel litovo, kuracisto kiel D-ro Zamenhof, kaj kiel parolanto de Esperanto, estas por mi granda plezuro paroli ĉi tie.

Umberto Eco iam skribis:

"Homoj ĉiam perceptas Esperanton kiel la proponon de iu ilo. Ili scias nenion pri la idealo kiu vivigas ĝin. Tamen estas la biografio de Zamenhof kiu sorĉis min. Endas pli bone konatigi tiun aspekton."

Mi ŝatus paroli pri kelkaj aspektoj de la vivo kaj verkoj de Zamenhof. Li estis ŝatata kuracisto kaj okulisto, kiu traktis malriĉulojn senpage. La fakto ke li iniciatis la solan vivantan lingvon, kies naskiĝdato kaj loko, la 26-a de julio 1887 en Varsovio, estas konata, aparte de esperantistoj. Oni ofte forgesas, ke estis pli ol 900 provoj dum la historio por krei komunan lingvon por la homaro - ĉiuj el ili malsukcesis krom la provo de Zamenhof! Tamen, mia ĉefa temo hodiaŭ estos la pli politika atingo de Zamenhof, kiel antaŭulo de homaj rajtoj kaj kiel pasia defendanto de paco, la plej baza homa rajto. Por kompreni la kontribuon de Zamenhof

en ĉi tiu kampo, endas diri kelkajn vortojn pri la historiaj cirkonstancoj en la 19-a jarcento en la parto de Eŭropo de kiu li venis.

Zamenhof estis judo kiu naskiĝis en Bjalistoko la 15-an de decembro 1859. Bjalistoko estas nun en orienta Pollando, sed tiam ĝi troviĝis en la litova provinco de la Rusa Imperio. Liaj ligoj kun Litovio estas multaj, interalie ke li edziĝis kun knabino de Kaunas, Klara Zilbernik. Dum la juneco de Zamenhof Bjalistoko estis urbo de 30.000 loĝantoj kaj estis tre plurlingva: la rusa, la germana, la pola, la belorusa, eĉ la litova, aŭdiĝis en ĝiaj stratoj. La plimulta lingvo estis la jida, ĉar ĉirkaŭ du trionoj de la tiama loĝantaro de Bjalistoko estis judoj. Zamenhof estis frapita per la manko de kompreno, kiu kaŭzis konstantan malamikecon kaj konfliktojn inter la lingvokomunumoj. Kelkfoje tiuj konfliktoj estis perfortaj. Ili ne komprenis la lingvon de la najbaro. Tial Zamenhof sentis ke la unua paŝo al repacigo kaj paco estus havigi al ili komunikilon - lingvo, tre facile lernebla, kie ĉiuj povus renkontiĝi kiel egaluloj kaj kie la fortuloj ne plu altrudus sian lingvon al la aliaj.



La kerna inspiro de la vivlaboro de Zamenhof estis anstataŭigi konflikton kaj militon per paco, harmonio kaj kunlaboro. La lingvo kiun li iniciatis, Esperanto, estis nur ilo, kvankam grava ilo, por atingi tiun celon. En 1915 Zamenhof publikigis sian *Alvokon al la Diplomatoj* en kiu li ellaboris kelkajn principojn por ke la paco kiu sekvas la Unuan Mondmiliton ne estu nur portempa batalhalto, sed daŭripova paco. Du principoj estas signifaj: la egaleco, aŭ egaleco de estimo, de ĉiuj landoj kaj de la etnoj ene de ĉiuj landoj; kaj alvokon por la starigo de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo, kiu devus havi supernacian Eŭropan Kortumon por certigi ke ĉiu nacia registaro kaj ĉiuj civitanoj respektu la konsentitajn regulojn. Jen kiel Zamenhof esprimiĝis per propraj vortoj:

Memoru, memoru, memoru, ke le sola maniero. por atingi tian pacon estas: forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj.

En tre reala senco, la klarvida Zamenhof antaŭvidis la Eŭropan Union, pli ol 40 jarojn antaŭ la komenco de eŭropa integriĝo. Tragike, Eŭropo devis suferi alian mondmiliton, multe pli terura ol la unua, antaŭ ol la plimulto fine komprenis, ke leĝe-deviga kondukmodo necesas inter nacioj kiel inter unuopuloj, kaj ke senbrida nacia suvereneco nepre kondukas al milito. Zamenhof klare antaŭvidis tion en sia Alvoko al la Diplomatoj, sed oni ne atentis liajn avertojn.

Kritikistoj de Zamenhof kelkfoje asertis ke li estis kontraŭpatriota, kaj ke li volas anstataŭigi naciojn per senforma, sentradicia homaro. Fakte, li tre klare disigis la sencon de vera patriotismo - amo al la propra lando - de ŝovinismo – malŝato kaj eĉ malamo por aliaj landoj. Patriotismon li laŭdis, skribante poezie pri sia "kara Litovujo; sed ŝovinismon la kutime milda Zamenhof kondamnis ege forte:

Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo



La skota poeto William Auld, bazis sian ofte tradukatan poemon en Esperanto, *La Infana Raso*, je la ideo ke la plej multaj el niaj nunaj militoj kaj konfliktoj montras ke la homaro kondutas sin kiel 2-jaraĝa infano, kiu insistas pri siaj propraj interesoj sed ignoras la interesojn de ĉiuj aliaj. Iu ajn kiu havis infanojn konas la grandegan evoluon de ilia konduto inter la aĝoj de 2 kaj 3. Kiam temas pri la tuta homaro, tamen, klaras ke granda parto de tiu evoluo

ankoraŭ ne okazis. Zamenhof komprenis, ke se la paco devos esti daŭra, ĝi devos baziĝi je justeco. Li vidis klare ke maljusto kondukas al rankoro kaj venĝemo, kiuj frue aŭ malfrue kondukas al konflikto. Lia ideo de justeco entenis ankaŭ lingvan justecon, kaj en tiu senco li estis multe pli moderna ol nia hodiaŭa socio. Zamenhof vidis ke le uzo de iu ajn etna lingvo kiel *lingua franca* - ĉu la angla, la franca, la germana aŭ la ĉina – kunportas nemeritajn, dumvivajn privilegiojn por la denaskaj parolantoj de tiu lingvo, kaj metas la plejmulton de la homaro je dumviva kaj maljusta malavantaĝo.

En la ĉi-supra senco Zamenhof antaŭeniras sian tempon per jarcentoj. Eĉ nun, 100 jarojn post lia morto, granda parto de la homaro ankoraŭ ne komprenas liajn radikalajn ideojn. Li substrekis la fundamentan unuecon de la homa raso. Liaj ideoj entenis ankaŭ la religian sferon, kie li proponis ke, kompreneble ĉiuj rajtas kredi, aŭ ne kredi, kaj ke ĉiuj religioj rajtas

konservi ĉiujn detalojn de la propra doktrino, pli bonus por la homaro, se religioj substrekus la komunajn trajtojn kaj ne la aferojn kie ili malkonsentas.

Mi finas per kelkaj versoj de la fama Zamenhofs *Preĝo sub la verda standardo*, kiu bone esprimis la internan ideon, la idealon kiu vivigis Esperanton kaj helpis ĝin disvastiĝi al ĉiuj partoj de la mondo dum kvin generacioj. Dum la unua Esperanto-kongreso en Bulonjo ĉe maro en 1905 tio estis la plej polemika elemento en la parolado de Zamenhof. La francaj esperantistoj, kiuj timis kontraŭjudismon post la Afero Dreyfus, insistis ke Zamenhof preterlasu la finan strofon, kaj aparte la sekvajn versojn:

*Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
ni ĉiuj de Di' estas filoj*

Zamenhof konsentis ne legi tiun strofon, kontraŭ sia pli bona juĝo. Nuntempe, 112 jarojn poste, la zamenhofs alvoko al unueco kaj paco inter kristanoj, judoj kaj islamanoj, inter homoj de ĉiuj religioj kaj de neniu religio, estas pli grava ol iam ajn.

Ni povas gajni tre multe de la studado de la verkoj de Zamenhof, ne nur pri Esperanto, sed antaŭ ĉio pri la profunda ŝanĝo de homa konduto kiun li opiniis necesa por certigi la pacan kunvivadon de nacioj. Kiel Eŭropa Komisionano por Sano, estas por mi granda honoro esti kun vi hodiaŭ por honorigi tiun grandan homon, kaj por ke ni alprenu kiel niajn proprajn la idealojn de paco kaj justeco por kiuj li donis sian tutan vivon.

HONORE AL D-RO L. ZAMENHOF (ENKONDUKO EN LA KONFERENCON EN FREIBURG)

Karaj geamikoj,

Céad míle fáilte! Kiel oni diras irlande, “cent mil bonvenoj” al vi ĉiuj! Nome de EEU mi elkore dankas al GEA pro la agrabla kaj efika kunlaboro en la organizado de nia komuna konferenco.

Estas por mi grandega honoro kaj ĝojo, ke D-ro Vytenis Andriukaitis, Eŭropa Komisionano por Sano, venis honorigi nian konferencon pri alia kuracisto de la sama litova regiono, la centjariĝon de kies morto ni solene memoras – la iniciatinto de nia bela lingvo, D-ro Ludoviko Zamenhof.

Komisionano Andriukaitis estas Eŭropa Komisionano pri Sano. Profesie li estas ĥirurgo kaj altranga litova politikisto. En 1984 li ricevis diplomon de historiisto de la Universitato de Vilnius. D-ro Andriukaitis estas la plej altranga politikisto en EU kiu parolas Esperanton, kaj kiu konas ties historion kaj kulturon. Jam kiel junulo li lernis Esperanton kaj subtenis ĝin dum la tuta kariero. En nia lingvopolitika konferenco en Nitro, Slovakio, pasintjule, li brile prelegis pri Esperanto kaj en Esperanto. Legeblas lia parolado en la oficialaj retpaĝoj de la Eŭropa Komisiono. Lia eminenta agado kuraĝigas aliajn politikistojn paroli pozitive pri Esperanto. Krom la litova kaj Esperanto, li flue parolas angle, ruse, germane kaj pole.



Pluraj kolegoj parolos pli detale pri Zamenhof kaj ties idealoj dum la tago. Do, mi komencu mallonge per eta citaĵo, kaj per poemo de unu el niaj plej elstaraj poetoj, la hungaro Kalman Kalocsay, kies antaŭnomo estas irlanddevena. Li verkis la poemon „Ni Laŭdu Lin“ memore al Zamenhof nelonge post ties

morto. Estas komento pri la internacieco de nia lingvo ke mi, irlandano, memorigos al vi belan poemon de hungaro dum germana kaj tuteŭropa konferenco!

Henri Dunant, Steve Jobs kaj aliaj: *Nur sukcesas ŝanĝi la mondon la homoj, kiuj tiom frenezas, ke ili pensas, ke ili povas fari tion.*

NI LAŬDU LIN....de Kalomano Kalocsay

Memora fest' ...dolora fest'...
 Funebre ni solenas...
 Ho, flugis for la flam' de l'kor'
 Kiun ni larme benas.

Nun nek kanon' kun tondra son',
 Nek sonoriloj festas...
 Nur batsonor' de nia kor'
 Pri la solen' atestas.

En vasta mond' malgranda rond'
 Ja estas ni, gefratoj,
 Sed kun potenc' en sankta senc'
 Kuniĝas la korbatoj.

Ho, kunsonor' de nia kor'!
 Funebru la Benatan,
 Per kies am', jen, flagra flam'
 Kunfandis rondon fratan.

Estingis sin la flam' de l' sin',
 Plu arde ĝi ne hardas,

Sed jen la Verk', ĝi malgraŭ ĉerk'
Kaj malgraŭ frostoj – ardas!

Ĝin vartu ni, ho, ardu ĝi,
Ke en malgranda sfero
Post vintra frost' la Pentekost'
Alvenu sur la Tero.

Ĝis kun ĝojbril' flamlangoj mil
Tra l'tuta mond' disflugas,
Ĝis falas, jen, la peza ĉen',
Nun kiu langojn jugas.

Ĝis en kompren', eterna ben'
Fратиĝos mondo tuta...
Ni laŭdu Lin, ke aŭdu nin
Homaro surdemuta.

Seán Ó Riain

PAROLADO DE ULRICH BRANDENBURG DUM LA KONFERENCO EN FREIBURG



Estimata sinjoro komisionano, sinjoro prezidanto, karaj geamikoj,
Ni kunvenis hodiaŭ por memori pri Ludwig Zamenhof, por honorigi lin kaj por festi la 130-jariĝon de la lingvo kiun li kreis. Mi devas konfesi ke mi ne ĉiun nokton dormas kun la verkaro de Zamenhof sub mia kapkuseno. Sed mi iom serĉis, relegis kaj komparis kun la nuna situacio. Kaj mi povas nur admiri lian klarvidon kaj antaŭvidon. Tio validas por la rilatoj inter “gentoj” kaj ŝtatoj (pri kiuj li skribis i.a. en la “letero al diplomatoj”), por la atento kiun li dediĉis al inter-etnaj konfliktoj (“homoj kiuj en sia patrujo fariĝas fremduloj”) kaj por la postulo de lingvaj rajtoj.

El siaj propraj spertoj en Bjalistoko li alvokis al frateco kaj justeco inter popoloj. Li fariĝis pioniro de homaj rajtoj, sed li ankaŭ distingis inter uzado de lingvo (tion povas ĉiu, egale kion li volas esprimi) kaj la idea flanko: tio,

kion esperantistoj hodiaŭ nomas interna ideo. La estiĝon de “unuiĝintaj ŝtatoj de Eŭropo” li

antaŭvidis jam en 1914 – sed li tuj diris ke por ili estas ankoraŭ tro frue. Fakte estis bezonataj du teruraj militoj antaŭ ol oni kreis la fundamentojn de la hodiaŭa Eŭropa Unio, kiu pro siaj historiaj meritoj prave ricevis la pacpremion antaŭ kelkaj jaroj.

Hodiaŭ ni observas kun zorgo ke tiu Eŭropo ŝajne atingis iun limon. Plimulto de la britaj voĉdonantoj postulis ekŝigon el la EU. Fortiĝas naciismaj movadoj kaj aŭtoritataj reĝimoj en pluraj membroŝtatoj. Estas strange ke kontraŭeŭropa propagando iĝis plej forta en landoj, kiuj plej profitas de la Bruselaj monrimedoj. Partprenado en balotoj por la Eŭropa Parlamento fariĝis plorinde malalta. Oni multe parolas hodiaŭ pri la verŝajnaj kaŭzoj. La Eŭropa Unio efikas malproksima, burokrata, netravedebla. Ĝi trudas sin en vian ĉiutagan vivon. Decidoj en la EU estas tiel komplikaj, ke nur burokratoj, lobiistoj kaj malmultaj politikistoj komprenas ilin. La EU fariĝis viktimo de kontraŭ-elita ribelo: ribelo, kiu samtempe sin turnas kontraŭ la tutmondiĝo, kaj kiun oni simile povis observi en Usono. Ke oni kulpigas la EU parte ankaŭ ŝuldiĝas al politikistoj, kiuj rutine kritikis Bruselon (en kies decidoj ili mem partoprenas), sed volonte ornamas sin per subvencioj kiuj venas de tie.

Ĝustas ke la EU – kiel ni konas ĝin hodiaŭ – estas projekto de elitoj: fakto, kiun en si mem oni ne povas kritiki. La tiutempaj fondantoj komencis per ekonomia integriĝo kaj poste aldonis aliajn agadkampojn, unu malgrandan paŝon post la alia. Iom post iom tiamaniere respondecioj transiris de la nacia al la supernacia nivelo. En Bruselo por tiu metodo ekzistas la esprimo “méthode Monnet”, nomita laŭ Jean Monnet – unu el la kunfondintoj. Kaj mi estas certa ke plej multaj homoj en Eŭropo hodiaŭ bone komprenas ke ni kiel individuaj nacioj iĝis tro malfortaj por protekti niajn interesojn sub la kondiĉoj de tutmondiĝo. Sed tamen en la publiko mankas la konscio ke tiu Eŭropo estas nia projekto. La gravaj debatoj - kun malmultaj esceptoj - restas je la nacia nivelo.



Karaj geamikoj,

Laŭ klasika difino ŝtato devas havi tri elementojn: ŝtatan teritorion, ŝtatan popolon aŭ civiton kaj ŝtatan potencon. La Eŭropa Unio havas teritorion. Ĝi havas (almenaŭ en certaj agadkampoj) ŝtatecan potencon. Ĝi ne havas ŝtatan popolon, sed almenaŭ 28 diversajn publikojn kun malsamaj interesoj. Ne ekzistas eŭropa civito – ecepte tiujn kelkajn centmil eŭropanojn kiuj serioze partoprenas kaj kundiskutas

en eŭropaj aferoj. Do jes: EU restis projekto de elitoj.

Kiel reagi? Unu respondo estas lasi pli da decidopovo al la loka aŭ ŝtata nivelo, reproximigi ĝin al la civitanoj. Tio en multaj kazoj havas sencon – sed ne forgesu ke ofte ĝuste la protektantoj de naturo kaj konsumantoj postulas plia akrajn eŭropajn normojn. La dua respondo enhavas pli grandan defion: “pli da Eŭropo”. La vojo al pli granda integriĝo havas ekonomiajn kaj socialajn, financajn kaj budĝetajn aspektojn, pri kiuj oni multe diskutas. Sed

ĉio tio nur povas funkcii, se oni paralele sukcesas fermi la emocian abismon inter EU kaj civitanoj, fortigi la eŭropan identecon. Kaj tiu tasko devas ankaŭ interesi nin esperantistojn en la Eŭropa Unio.

La ekziĝo die Britio el la EU levas interesajn demandojn ankaŭ pri la lingva situacio. La prezidanto de la Eŭropa Komisiono Jean-Claude Juncker en parolado, kiun li faris (franclingve) la 5an de majo, esprimis la supozon ke reduktiĝos la rolo de la angla lingvo en EU. Ĝi ne malaperos: Irlando kaj Malto, kie la angla lingvo ja havas oficialan staton, ne esprimis intencon ekziĝi. Sed imagu nur dum momento ke ili farus: tiam ni havus seriozan debaton pri la angla en la Eŭropa Unio – unuafoje debaton pri la angla kiel internacia lingvo ne nur kiel fakto (pri kio oni apenaŭ povas dubi), sed kun ĉiuj juraj kaj politikaj konsekvencoj.

Tiu debato nun ne okazos, ĉar la angla konservos sian staton kiel unu el la naciaj lingvoj. Krome jam tiom da homoj tiom da energio investis en la lernadon de la angla kaj kontraŭus misinveston – kaj ekonomia tutmondiĝo fortigas tiun tendencon sendepende de la situacio en la EU. Amuze estas sekvi la komencantan diskuton inter fakuloj kiel evoluos tiu “EU-angla”, kiu funkcios preskaŭ sen denaskaj parolantoj. Tamen ni ne zorgu pri la burokratoj en Bruselo : ili sukcesos interkompreniĝi.

Pli grava estas la risko, kiun mi menciis antaŭe, la renaskiĝantaj naciismoj. Antaŭ jaroj la tiama franca prezidanto Mitterand parolis antaŭ la Eŭropa Parlamento. Unu el la centraj frazoj estis: naciismo signifas militon. Tio estas la sperto de la 20a jarcento, kaj ĝi memorigas nin pri la alvoko de Zamenhof en 1914. Homoj ekkonscias pri tiu danĝero, multaj iris demonstracii en niaj urboj. Ili ekkonscias ke necesas konstrui la eŭropan civiton, kiu ne ekzistas. En tiu kunteksto ankaŭ neŭtrala lingvo ne plu dekomence povas esti rigardata kiel frenezaĵo. Ni ne faru al ni iluziojn: se iu volas ridindigi la eŭropan ideon, li bezonas nur aserti, ke “ekde nun en la EU ĉiuj estos devigataj lerni Esperanton” – estus mortiga argumento. Sed sen iluzioj: pordeto malfermiĝis por inteligentaj projektoj, kiujn ankaŭ ni povas proponi ke eble eĉ ricevi subvenciojn de la instancoj.

Karaj geamikoj,

La fina venko ne atendas nin ĉirkaŭ la angulo. Sed valoras vivteni la oferton de Zamenhof, la projekton kiun li kreis antaŭ 130 jaroj. Vivteni ĝin estas respondeco de la Esperanto-movado, ne facila tasko sub hodiaŭaj organizaj kaj financaj kondiĉoj. Aliflanke: la movado jam longe ne plu ekzistus, se ĝi ne mem estus unu el la plej simpatiaj civitoj kiujn almenaŭ mi konas!

Ulrich Brandenburg

KUNVENOJ DE EEU DUM LA FREIBURGA GERMANA E-KONGRESO



Post la konferenco okazis unuhora diskuto de la estraro de EEU kun la Eŭropa Komisionano Andriukaitis pri la eblecoj kiujn EEU povus realigi kun helpo de la komisionano. Pri la enhavo de la interparolo vi povas legi en la artikolo „Esperantistoj ne scias...“.

La 3-an de junio kunsidis la estraro de EEU, kiu traktis kelkajn aktualajn temojn, kiel la estontajn konferencojn de EEU, raporton pri la realigata projekto „Rememoroj pri rifuĝintoj el la Eksjugoslavia milito“, kaj propono por la funkcioj de prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario en la estraro elektota la postan tagon. Tiusence en la nova estraro kvinmembra estis proponitaj la samaj personoj en la tri funkcioj kiel ĝis nun: Sean O Riain kiel prezidanto, Flory Witdoeckt kiel vicprezidantino kaj respondeculino pri financoj kaj Zlatko Tišljar kiel sekretario. Estas aparte starigita la grava tasko por la estraro serĉi tuj personojn por la funkcioj de la respondeculo por financoj kaj de la sekretario en la sekva mandato post tri jaroj, ĉar Zlatko Tišljar kaj Flory Witdoeckt pro la aĝo ne plu plenumos tiujn funkciojn.

La 4-an de junio okazis ĉefa asemblea kunsido kun la oficiala raporta tagordo kaj novelektoj de la estraro. Ĉeestis 10 asembleanoj kio sufiĉis ke la asembleo plenrajte decidados, ĉar la kotizojn pagis 19 landoj kaj 10 estis reprezentitaj. Post la raporto pri la agado en 2016, pri la financoj en 2016 kaj revizoro kaj ioma diskuto ĉiuj raportoj estis akceptitaj unuvoĉe krom tiu por financoj kun du sindetenoj. Ankaŭ laborplano por 2017 estis akceptita. Estis elektata nova estraro por la 3-jara mandato inter 2017 kaj 2020. Prezintinte la 5 kandidatojn la prezidanto de EEU voĉdonigis la asembleon kiu unuanime akceptis ĉiujn sen doni pliajn proponojn. En la nova kvinmembra estraro estas tri antaŭaj membroj kaj du novaj. Tiel la estraro nun estas tre kompetenta por plua laboro, aparte je la nivelo de rilatoj kun la organoj de EU. La prezidanto estas d-ro Seán Ó Riain, irlanda diplomato, nun laboranta en Vieno, vicprezidantino estas Flory Witdoeckt, entreprenistino el Belgio, la sekretario estas Zlatko Tišljar, emerito el Slovenio/Kroatio. La du novaj membroj estas dro Ulrich Brandenburg,

longjara ambasadoro de Germanio, nun loĝanta en Berlino kaj Jozef Reinvar, diplomato el Slovakio. Interese ke eĉ tri membroj sufiĉe proksime loĝas kaj povus se necese urĝe kunveni. Ne daŭrigis siajn estraranecojn, Petro Balaž, Sandra Schweder kaj Nikola Rašić. Samtage okazis la dua malferma asemblea kunveno kun interesitaj kongresanoj kiu traktis la temon de perspektivoj por Esperanto en EU post Briteliro. Partoprenis pluraj kongresanoj en vigla debato.

Zlatko Tišljarić

ESPERANTISTOJ NE SCIAS KIUJN KOMPETENTOJN HAVAS POLITIKISTOJ KAJ APARTE TIUJ EN EEU

Ni ĉiam pli en EEU vidas ke esperantistoj daŭre vivas kun la iluzio ke superaj politikistoj povas solvi nian ĉefan deziron – enkonduki Esperanton en lernejojn aŭ en EU ĝenerale. Kaj ili daŭre skribas kaj postulas de politikistoj ion tiusence fari.

Politikistoj ĉiam agis kaj agas cele al sukceso de sia mandato kaj tio signifas ke ili zorgas pri leĝoj kiuj portas ion utilan aŭ por ili aŭ por grandaj kvantoj da homoj kiuj pro tio voĉdonas por ili. Tiusence ili neniam subtenas iun idealismon – ĝi ja portas materialan utilon nek al ili nek al multegaj homoj.



La plej bonaj ekzemploj estas esperantistoj kiuj estis ŝtatsprezidantoj: Jonas (aŭstra prezidanto dum du mandatoj en sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento) kaj Tito, ŝtatsprezidanto en Jugoslavio inter 1945 kaj 1980). Ili ambaŭ publike plurfoje deklaris sian subtenon al Esperanto, sed ankaŭ plurfoje deklaris ke ili mem ne povas oficialigi ĝin, se malantaŭ klopodo akceptigi iun leĝon ne troviĝas forta postulo de popolamasoj. Kaj Tito diris eĉ du-foje ke por atingi

postulon de la popolo, tion devas fari vi – esperantistoj. Sekve ni devas informadi la popolon tiel ke plejmulto sciu pri la avantaĝoj kaj valoro de Esperanto kaj tiam ni povus havi subtenon de multaj, se ni proponus iun leĝon al koncerta ŝtata organo. Tiun konsilon esperantistoj neniam obeis. Ili daŭre plu kredas ke sufiĉas postuli de ĉionpovaj politikistoj, ke ili faru laboron anstataŭ ni. Ili certe ne faros tion, ĉar por atingi informitecon de plimulto de popolo pri Esperanto en pozitiva senco, necesas agadi multe pli ol 4 jarojn kiom daŭras mandato de politikisto kaj ankaŭ por ke tia laboro povu sukcesi devas tre granda kvanto da esperantistoj daŭre aktivadi pri ekstera informado.

Sed ofte politikistoj eĉ ne havas leĝajn kaj konstituciajn rajtojn ŝanĝi ion en lernaja sistemo. Tio estas la kazo ĉe EU. La superaj EU-organoj (Parlamento kaj Eŭropa Komisiono) ne havas kompetenton decidi ion ajn en sfero de kulturo kaj lernejoj. Kompetentajn tie havas nur naciaj ŝtatoj. Dum la Freiburga Kongreso la estraro de EEU havis longan interparolon kun komisionano de Eŭropa Komisiono Vytenis Andriukaitis pri tio, kion li povus fari por Esperanto kun subteno de la E-movado. Li klare diris. Kompetentajn pri lernejoj sistemoj havas nur Eŭropa Konsilio (Konsilio de edukministroj de ĉiuj 27 ŝtatoj). En ĝi minimume 7 ministroj rajtas proponi ion kio devas esti temo por diskuto en la Konsilio. Se, do, iu temo atingas la tagordon, ĉiuj ministroj devas konsenti por ke oni akceptu tion.

Kaj nur tiam la Eŭropa Konsilio povas postuli de la edukkomisionano en Eŭropa Komisiono (en nuna konkreta situacio, sinjoro Navracsecs – komisionano nomumita en Hungario) ke li proponu leĝon al Eŭropa Komisiono kiu realigus la konkludojn de la Eŭropa Konsilio pri Edukado.

El tio sekvas, ke unue ni esperantistoj (UEA, EEU aŭ iu internaca E-Komisiono) devas formuli akcepteblan kaj realisman proponon, kiun oni povos proponi al landaj edukministroj. Landaj esperantistoj en minimume 7 landoj devas kontakti sialandajn ministeriojn pri edukado kaj la ministrojn por klarigi kaj prezenti tiun proponon kaj konvinki ilin pri la graveco de tiu propono por sialandaj gelernantoj kaj ŝtatoj. Se oni havas subtenon de almenaŭ 7 ministroj, tiam ni povus informi sinjoron Andriukaitis, kiu povas prezenti tiun ideon kun nomoj de la sep ministroj al sinjoro Navracsecs kaj peti lin ke li plu transdonu tiun proponon al la prezidanto de Edukkonsilio, por ke li post konsultigo kun la sep ministroj metu la temon al la tagordo. Intertempe ĉiuj esperantistoj devas klopodi informi pri tio laŭeble persone sialandajn ministrojn por certigi en la konsilio plimulton ke tiu propono estu akceptita. Aŭ lasi la aferon al hazardo kaj preskaŭ certe malsukcesi.



Kiel vi vidas, la ŝancoj ke oni faru ĉion tion dum du jaroj kiom ankoraŭ daŭras la mandato de dro Andriukaitis estas ege malgrandaj. En EU Eŭropa Komisiono aŭ Parlamento ne rajtas akcepti leĝojn sen antaŭa aprobo en la Eŭropa Konsilio (pri Edukado). La Eŭropa Komisiono estas nur plenumanto de iliaj decidoj. Simile estas en federaciaj landoj kiel ekz. Germanio, kie la federacia registaro, kiun gvidas sinjorino Merkel tute ne rajtas akcepti iun ajn

leĝon pri lernejoj (do devigi la lernejojn ion enkonduki en la sistemon), ĉar tiun kompetenton havas nur la federaciaj unuoj. Ili decidas pri edukado ĉiu en sia regiono kaj tial ili estas multflanke sufiĉe diferencaj.

Kiel do atingi politikan decidon pri enkonduko de Esperanto en lernejojn? Praktike neniel. Kiel venkis la angla tiusence? Per fortego de la influo de Usono kaj ties komerco kaj per

investo de multa mono en reklamadon de la lingvo far Usono kaj Britio. En ĉiuj mondaj lernejoj oni instruas almenaŭ unu fremdlingvon kaj nuntempe la angla praktike troviĝas ĉie, Aliaj lingvoj nur fojfoje apud la angla.

Malgraŭ tio EEU ne malesperas. Ni elpensis strategion kaj ni skribos pri ĝi tuj post kiam ni scios ĉu la komenca antaŭkondiĉo estos plenumita, kaj tion ni scios en septembro.

Zlatko Tišljar

RAPORTO PRI LA 94-A GERMANA ESPERANTO-ASOCIO

EU-civitanoj Esperanton parolantaj diskutis kun eŭropaj politikistoj Esperanton parolantaj

Gravaj impulsoj eliris el la komuna kongreso de EEU kaj Germana Esperanto-Asocio 2017

Pentekoste 2017 en Freiburg im Breisgau, Germanio. Vytenis Andriukaitis el Litovio, EU-komisionano pri sano kaj sekureco de nutraĵoj, d-ro Seán Ó Riain el Irlando, vicambasadoro en Vieno, Ulrich Brandenburg, emerita ambasadoro de Germanio ĉe Nato (Bruselo), en Moskvo kaj en Lisbono, Jozef Reinart, slovaka diplomato, kaj Zlatko Tišljar el Slovenio, ĝenerala sekretario de EEU - gravaj personoj kontribuis al la sukceso de tiu duobla Esperanto-kongreso.



Esperanto-muziko

Esperanto-muziko beligis la kongreson. La juna rep-regea muzikisto Jonny M el Germanio kaj la grupo „Kaj tiel plu“ el Katalunio prezentis sian arton, unue en moderna kaj poste en popolece katalunia stilo.

Emerita ambasadoro estiĝis prezidanto de Germana Esperanto-Asocio

La ĵus emeritiĝinta ambasadoro Ulrich Brandenburg elektiĝis nova prezidanto de la Germana

Esperanto-Asocio. Li estas denaska esperantisto. Elektiĝis krome kiel estraranoj Barbara Brandenburg por administraj aferoj, d-ro Matthias Hecking kiel trezoristo, kaj la Germana Esperanto-junularo ensendis kiel reprezentanton de GEJ Cornelia Luszczek.

Ekskursoj

Dimanĉe posttagmeze okazis ekskursoj:

- en la malnovan urboparton de Freiburg,
- en la novan ekologie kaj sociale elstaran urbokvartalon Vauban,
- al la atomcentralo Fessenheim, nur 25 km de Freiburg,

- al la muzeo Unterlinden en Colmar, Francio
- al la proksima monto Schauinsland (elparolu: ŝaŭinsland – t.s. rigardu en la landon)

Partnerurboj

Prezentiĝis la ĝemelurboj de Freiburg (aparte kie ekzistas Esperanto-kontakto), kaj detale raportis Petro Zilvar kaj Zsófia Kóródy pri la tre vigla urbopartnereco de la Esperanto-urbo Herzberg/Harz kun siaj partner-urboj.

Politikaj asocioj

Kunsidis ankaŭ la politikaj asocioj esperantorilataj: la Verduloj (AVE, kunlaboranta fakasocio de UEA pri ekologio), kaj E.D.E. (Eŭropo Demokratio Esperanto).

La kongrestemo: paco

La kongrestemo Paco kaj Milito sufiĉe amplekse kaj profunde okupis la kongresan programaron. Pri ĝi temis la ĉefprelego de Jomo Ipfelkofer sabaton matene. Posttagmeze Jürgen Grässlin, estro de la „Armadinformburoo“ (RIB) en Freiburg, raportis detale pri la armilproduktado en Germanio germanlingve, esperanten interpretite de Ursula Niesert. Poste Alois Eder analizis la kaŝan pormilitan kaj la malkaŝan porarmilan propagandon, kiu uzas la psikologian rimedon de la „signifikadroj de vortoj“ (neŭrolingvistike nomata „framing“). Citaĵo el la juda saĝotradicio: „Atentu pri via vorto, ĝi finfine fariĝos via sorto“.



Eŭropa Unio, sukcesa pacoprojekto

En tuja radioelsendo (podkasto) de „kern.punkto.info“ Johann es Mueller kaj Eva Fitzelová bonvenigis sur la podio du gastojn kompetentajn pri eŭropa politiko: la novbakitan GEA-prezidanton Ulrich Brandenburg, emerita germana ambasadoro, kaj la irlandanon d-ro Seán Ó Riain, vicambasadoro en Vieno. La publiko vigle kundiskutis. Ankaŭ aŭskultantoj el la tuta

mondo uzis la eblecon skribi sian opinion, kiun laŭtlegis la „advokato de la publiko“ Julia Noe. Jozef Reinvart el Slovakio kaj Zlatko Tišljar el Slovenio substekis en la diskutado, kiom gravas edukado por atingi eŭropan identecon. Diskutanto tiucele postulis komisionojn de historiistoj, kiuj harmoniigu la lerneajn historilibrojn nacieme skribitajn.

Paco inter religioj

Paco inter la religioj estas grava fundamento por paco en la mondo. Tiucele lundon antaŭtagmeze okazis podia diskuto inter fideluloj de ses religioj respektive mondkonceptoj: Albrecht Kronenberger, katoliko, Hans Böheim, protestanto, Amina Feder, islamano, Robert Springmann, bahaano, Manfred Westermayer, budhisto, Wera Blanke, humanisma liberpensulino. Vigle partoprenis en la interŝanĝo de kredoj ankaŭ la publiko. Judino tre interesita troviĝis inter la diskutanta publiko.

Esperanto en lernejoj

La Esperanto-Ligo de Baden-Württemberg (BAVELO) decidis entrepreni fortostreĉon, por konatigi Esperanton en la lernejoj. Minimume ĉiu lernanto unufoje dum sia lerneja kariero aŭdu pri Esperanto. Nur se li aŭ ŝi scias pri Esperanto, eblas al li aŭ ŝi decidi por lerni la lingvon propravole, ekzemple per interreta kurso.

Esperanto-libroj

La riĉa libroservo ankaŭ entenis Esperanto-lernolibrojn por turkoj kaj por araboj. Ĉu Esperanto iam estos rimedo por integriĝo?

Alois Eder

AGADO DE ASOCIO DE VERDULOJ ESPERANTISTOJ (AVE) DUM LA KONGRESO

La kongreso de AVE, kunlaboranta fakasocio de UEA pri Ekologio, okazis 2017-06-04 en Friburgo* en Brisgovio, Germanio okaze de la komunaj kongresoj 2017 de EEU kaj GEA. Partoprenis nur 4 membroj de AVE el 4 landoj, ĉar samtempe daŭriĝis la GEA-jarĉefkunsido, kaj ankaŭ EEU daŭriĝis sian kunsidon. Kiel sekretario de AVE mi rakontis pri la tri evoluo-subtenaj projektoj kaj ni traktis la temon „Estonteco de AVE“. Krome mi gvidis ekskurson tra la ekologia kvartalo Vauban.

A: Estonteco de AVE:

Mi, D-ro Manfred Westermayer, transprenis la postenon de sekretario sen salajro en 1991, kaj decidis transdoni la torĉo(j)n al aliaj. Temas pri la jenaj laborkampoj de AVE:

- Asocia organizo, membroj, financoj, sendado de AVE-Novaĵoj:

La kolekto de nia (nun semajna) novaĵletero AVENO troviĝas sur nia retejo: verduloj.org

- Kunlaboro tutmonde kun la Verdaj Partioj:

AVE partoprenis 2017-03-30/04-02 la Tutmondan Kongreson de la Verdaj Partioj en Liverpoolo; tie ni informis pri Esperanto. Ni renkontis 10 homojn kiuj parolas Esperanton, kaj tradukis la Deklaron de Liverpoolo en Esperanton. Sur nia retejo troviĝas detala informo pri tiu kunlaboro ek de 1984. www.verduloj.org (serĉu: „Deklaro“).

Rezulto de la kunveno:

George Sossois, Bruselo, pretas daŭrigi la kunlaboron kun la verdaj partioj.

- Informi la esperantistojn pri la Verd-Partiaj programoj kaj kunlabori kun NRO/CSO-oj de la Esperanto-Movado (UEA kaj SAT, Vegetaranoj, k.a.)

Andreas Langholf (skribe informis) pretas transpreni tiun taskon

- Per-Esperantaj Evoluo-subtenaj projektoj:

Mi (M.W.) daŭrigas kunlabori kaj kolekti financojn por la tri kurantaj projektoj ĝis fino de la nunaj**:

1. gastigejo por 8 lernantinoj en Tanzanio pro ofte longa distanco al ilia hejmo (6.000 EUR, ni jam kolektis 1.400, eble Bosch-fonduso subtenas per 5-8 mil - tiam estus por 16 lernantinoj);

2. kvara projekto Akvo por Kalima (DR Kongo), (25.000 EUR, ni esperantistoj kolektu 5 mil, krome 15 mil espereble de WKV AG, kaj 5 mil de la civitanoj de Kalima);

3. nova malgranda projekto pri rearbarigo en Uvira (DR Kongo) (inter 200 kaj 500 EUR).

*) Friburgo en Brisgovio – ni ankoraŭ ne findecidis pri la skribmaniero de Freiburg im Breisgau; eble tiu versio, kiu similas la loka dialekto, taŭgas.

**) informoj troveblas sur: verduloj.org/afriko.htm

B: Kial Per-Esperanto-Agado?

UN lanĉis la 17 novajn evoluo-celojn. La Esperanto-Movado pretas kunlabori rilate daŭripovon:

- unue informi pri Esperanto kaj instrui Esperanton;
- due agadi por-Esperanto en evoluiĝantaj landoj;
- kaj trie necesus agadi per-Esperanto subteni evoluon ĝenerale.

Necesus organiza subteno flanke de UEA kaj SAT kaj de naciaj Esperanto-organizaĵoj tiel ke la financaj subtenoj povus esti kolektataj pli efike kaj regule, organize subtenanta la izolitan agadon de unuopaj grupoj (kiel AVE) aŭ personoj. Temas pri:

1. Bezono pri formalaj donaco-kvitancoj por la financ-oficejoj de unuopaj ŝtatoj, tiel ke donacantoj povas redukti sian imposto-pagon, kio ĉefe gravas se firmaoj aŭ aliaj fondusoj donacas.

2. Inform-kolekto pri kvalito de tiaj projektoj; unue kiel datum-bazo kaj due indus havi konfirmon de neŭtrala persono pri la faritaj projektoj malgraŭ tio ke 100%a garantio ne eblas.

AVE en kunlaboro kun aliaj grupoj da esperantistoj kaj eĉ kun ne-esperantistaj grupoj subtenadas projektojn en Tanzanio kaj D.R. Kongo, kaj kelkfoje unuopajn personojn.

C: Ekskurso tra la ekologia kvartalo Vauban

Mi gvidis grupon da 18 personoj - post komuna tagmanĝo sur alteco super la urbo sub kaŝtanoj - tra la relative nova ekologia urbokvartalo Vauban en Friburgo, kie ĝenerale la domoj estas konstruitaj tiel, ke ĉiuj bezonas malmulte da hejt-energio, pluraj produktas kurenton pere de PV (fotovoltaiko), kaj kelkaj uzas kombinitan varmo-kurento-generatorojn. Du grandaj garaĝo-konstruaĵoj je la rando de la kvartalo helpas ke nur malmultaj aŭtomobiloj troviĝas ene de la kvartalo. La kvartalo enhavas multajn verdaĵojn, infanoj povas ludi facile en alogaj spacoj; la pluvakvo – ankaŭ de tegmentoj - unue iras en fosajon kaj tiamaniere nutras la grundakvon. Estas pluraj komunumaj domoj, kaj al la kvartalo apartenas la t.n. sun-ŝipo, kie en teretaĝo estas vendejoj kaj oficejoj, kaj supre staras domoj, kies tegmentoj konsistas nur el fotovoltaikaj tabuloj.

Detalan priskribon donas broŝuro de la kvartala civitana asocio, finance subtenita de la urba administracio.

Manfred Westermayer

OSMO BULLER FARIĜIS PREZIDANTO DE TAIVALKOSKI



La eksa ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller aktive engaĝiĝis en la politika vivo de sia naskiĝloko Taivalkoski en Norda Finnlando, kien li transloĝiĝis en marto ĉi-jare. En la municipaj elektoj en aprilo li estis la sola kandidato de la Maldekstra Ligo kaj estis elektita kun la tria plej granda nombro da voĉoj inter ĉiuj kandidatoj. La elektoj alportis grandan malvenkon al la Centra Partio, kiu ĝis nun difinis la politikon de Taivalkoski, ĉar dum 40 jaroj ĝi sola havis plimulton en la loka deputitaro. Plia persona sukceso de Buller sekvis en la inaŭgura kunveno de la nova deputitaro la 19an de junio, en kiu li estis unuanime elektita kiel ĝia prezidanto por la kvarjara periodo ĝis majo 2021. La novelektita prezidanto afable konsentis respondi kelkajn demandojn de la redakcio de *La Ondo de Esperanto*.

Kiun rolon havas la prezidanto de la

deputitaro?

Li estas kvazaŭ la unua civitano de la municipo, kun iel simila rolo, kiun la prezidanto havas en UEA. Se kompari kun UEA, la deputitaro estas la supera organo kaj do ekvivalenta al la komitato de UEA. Ĝi elektas municipan estraron, kiu havas propran prezidanton, male al UEA, kie la prezidanto gvidas ambaŭ organojn. Krome ekzistas la urbestro, kiu same kiel la ĝenerala direktoro de UEA havas parolrajton sed ne voĉdonrajton en la deputitaro kaj la estraro. Ankaŭ mi rajtos ĉeesti la kunsidojn de la estraro kaj krome mi havos diversajn reprezentajn taskojn, ekz. komence de julio mi gvidos delegacion al Estonio.

En kiu senco via elekto diferencas de antaŭaj elektoj de la prezidanto?

Ĉefe en tio, ke post 40 jaroj la prezidanto ne plu estas deputito de la Centra Partio kaj ke unuafoje la postenon ricevis la Maldekstra Ligo, kvankam ĝi havas nur unu deputiton el 23.

Kial via elekto tamen estis ebla, eĉ unuanime?

Parte pro tio, ke mi ĉiam havis bonajn rilatojn kun la reprezentantoj de ĉiuj partioj, precipe dum miaj periodoj kiel municipa sekretario pri kulturo 1989-1991 kaj direktoro de la Päättalo-instituto 2002-2004. Eble mi ankaŭ estis facile akceptebla por ĉiuj pro mia nepartopreno en iuj lastatempaj konfliktoj en la gvidaj organoj. La elekto tamen surprizis min, ĉar kiel la sola deputito de mia partio mi ne revis pri ĝi, esperante gajni nur lokon en unu-du komisionoj. Fine, krom prezidanto de la deputitaro, mi elektiĝis ankaŭ al la grava kontrola-revizia komisiono, kiu ĉefe kontrolas la agadon de la estraro.

Ĉu okazis surprizoj ankaŭ ĉe aliaj elektoj?

La Centra Partio perdis plimulton en la estraro kaj en ĉiuj komisionoj, sed ĉar ĝi ne plu havas plimulton en la deputitaro, tio kompreneble ne estis surprizo. Unikaĵo tamen estas, ke kaj la deputitaro kaj la estraro ricevis maldekstran prezidanton. Krome, unuafoje en la historio de Taivalkoski la prezidanto de la estraro estas virino, nome la socialdemokrato Heli Hietala.

Ĉu en iuj okazoj ankaŭ via Esperanto-agado estis menciita?

Jam dum la elektokampanjo ĝi estis menciita multfoje kaj verŝajne aperis neniu intervjuo kun mi, en kiu oni ne tuŝis ĝin. Ĉar mi dediĉis pli ol duonon de mia profesia vivo al Esperanto, estas ankaŭ ne eble prezenti min sen atenti pri tio. Raportante pri mia prezidantiĝo unu gazet-artikolo eĉ en la titolo skribis, ke esperantisto estis elektita. Mia esperantisteco aŭ Esperanto ĝenerale estis neniam menciita malgravige aŭ moke sed ĉiam kiel io normala kaj mia sperto ĉe UEA eĉ kun aparta aprezo.

La Ondo de Esperanto

STRATEGIO KAJ AMIKUMU



Duolingo kaj Amikumu estas multe pli signifaj por la evoluo de Esperantujo ol dekoj da paĝoj de filozofumado en strategiaj laborplanoj, skribas Dennis Keefe. Li opinias, ke la sukcesoj de la projektoj povas utili por eĉ pli vaste diskonigi Esperanton al reta publiko. Mi pensas, ke la esperantistoj kiuj donacis iom da mono lastjare al la projekto Amikumu povas fieri pri sia investo en la estontecon de Esperantujo. La projekto Amikumu, laŭ strategia vidpunkto, estas elstare bona ilo por kunigi lokajn kaj vojaĝantajn

esperantistojn tra la tuta mondo.

Multaj el vi jam konstatis tion en viaj lokaj grupoj; Esperanto-parolantoj ĝis nun nekonataj aŭ nevidataj subite ekaperas per la radaro de Amikumu, je eble nur kelkcent paŝoj de vi. Lastasemajne en Koreio, kaj mi jam aŭdis pri tiaj bonŝancaj malkovroj en la kongresurbo Seulo.

Sed nun pli da bonaj trafaj atingoj de Amikumu survojas, ĉar baldaŭ aperos grava, signifoplena dua etapo en la disvolviĝo de tiu aplikaĵo por saĝtelefonoj, kaj estas ĝuste tiu dua etapo kiu starigos eĉ multe pli fortikan strategian bazon kiu, nerekte sed abunde, helpas al esperantistoj de ĉiaj verdaj pensokampoj. Atingo pri kies boneco ĉiaj esperantistoj finfine espereble interkonsentos: Amikumu kapablas helpi ĉiujn porulojn, kontraŭulojn kaj kio-okazis-ulojn, samtempe kaj nediskriminacie. Amikumu estas preskaŭ tiel bongusta kiel la lingvo mem.

Kio estas tiu dua etapo kaj la strategia sekvo? Tio estos la lanĉo de la apo en *aliaj* lingvoj, por diverslingvaj lingvolernantoj. Ekzemple, en la kataluna aŭ la irlanda aŭ la bulgara aŭ la latina aŭ la urdua aŭ la keĉua aŭ la lingala, ktp.

Mi ne scias ĝuste kiuj lingvoj aperos nek en kiu vicordo, sed ĉiu aldonata lingvo kreos, speciale se la lingvo estas relative neofta, espereble grandan entuziasmon kaj dankemon en la

mensoj de la uzantoj de unu lingvokomunumo post la alia. Mi ĵus vidis unu ekzemplon de tio: homo kiu parolas la jidan lingvon. [Vidu mem.](#)

Kun bona merkataka strategio, kaj eĉ sen ĝi, povos multobliĝi ĝuste tia tre pozitiva mesaĝo en multaj aliaj lingvoj. Tio estas, homoj ekster la Esperanto-movado kontribuos al la varbado por Amikumu, varbado en kiu Esperanto profitos.

Tia efiko kongruas kun tiu de Lingvaj Festivaloj kiam tiuj festivaloj estas sponsorataj de esperantistoj. En Lingva Festivalo, ni esperantistoj kreas eventon kiu servas aliajn lingvojn, ne nur la nian.

Jam dum la tria Lingva Festivalo de Francio en 1997 (vidu tutlandan [raporton de la unua televidokanalo TF1](#)), prezentiĝis ankaŭ la jida lingvo, kaj la instruanto de la jida lingvo, simile al tiuj de 84 aliaj lingvoj, kunlaboris por altiri homojn al la Festivalo. Poste ĉeestantoj de tiuj Lingvaj Festivaloj konstatas la valoron de Esperanto kiel naturan gvidokernon de festivalo kiu klopodos respekti kaj helpi ĉiajn lingvojn de la mondo.

Simile la projekto Amikumu, je multe pli alta nivelo ol tiu de Lingvaj Festivaloj, kreas amikojn de lingvoj kiuj siavice povos komenci paroli pri Amikumu tre favore. Tiuj neesperantistoj eble diros pri ni “Ĉu vi vidis kion la esperantistoj kreis por ni?! “Belege!!” “Se vi lernas la katalunan lingvon, uzu Amikumu kaj vizitu lernantojn proksime de vi!”

La sociaj medioj kiuj vibras en la mondo de la kataluna probable laŭdos Amikumu; simile en la germana komunumo, la rusa, la ĉina, la latina, la klingona, kaj eĉ la volapuka, se tiu vosto ankoraŭ svingiĝas.

Sed Amikumu fekundigos ankaŭ la grundon de la tradiciaj amaskomunikiloj. Povas ekaperi tra la tuta mondo, per la helpo de merkatico kaj publikaj rilatoj, artikoloj pri Amikumu kaj pri la motora rolo de Esperanto.

Merkatika celgrupo por Amikumu-istoj povus esti, inter aliaj, ĉiuj jutubistoj kiuj instruas lingvojn. Ĉe la retejo Jutubo, instruanto de la galega lingvo havas 32 mil vizitantojn por la unua leciono, la latina havas pli ol 150 mil, la svahila pli ol 500 mil, la portugala pli ol milionon, kaj vi povas imagi kiom da retaj, perjutubaj lernantoj ekzistas por pli ofte studataj lingvoj!

Kaj konsideru, ke tiuj nombroj reprezentas nur unu retan instruiston; en kelkaj lingvoj estas dekoj da kursgvidantoj kiuj instruas la saman lingvon, kaj ĉiuj havas siajn aldonajn lernantojn! Estas antaŭvideble, ke multe da lingvoinstruistoj povas rekomendi Amikumu por ke iliaj lernantoj povu pli multe praktiki la lernatan lingvon.


Ne nur tio. Valoras ne nur la celgrupo de lingvoinstruistoj; ankaŭ tre fruktodonas tri aliaj strategiaj grupoj, kiujn mi provizore nomos lingvaj komentariistoj (ekzemple, Paul de Langfocus), lingvaj lernokonsilistoj (ekzemple, Benny Lewis) kaj poliglotoj (ekzemple tiu de [“Teen Speaks over 20 Languages”](#)). Kelkaj el tiaj jutubistoj atingis pli ol 5 milionojn da vidoj, kaj eĉ ekzistas malgranda grupo de jutubaj popularuloj kiuj preterpasis 10 milionojn.

Mi kredas, ke baldaŭ tiuj lingvokomentariistoj, kiuj abundas sur la Interreto, povas ekpreni la novajn lingvojn lanĉitajn kaj lanĉotajn de Amikumu (kataluna, islanda, korea, ktp.), kaj ne dekmiloj (kiel nun ofte estas la kazo en Esperantujo), sed centmiloj, kaj eĉ milionoj da homoj ekaŭdos pri la bona laboro de la esperantistoj Chuck Smith, Richard Delamore, kaj la Amikumu-teamo.

Jen nia plej bona ekzemplo de tio, kio estas parto de la puzlo de vera strategio kaj Esperanto.

Dennis Keefe (El Libera Folio)

ERNESTO KAJ ĴUĴA CSISZAR



La 25-an de majo 2017 mortis en Hungario en sia 76-a jaraĝo Ernesto Csiszar. Mi renkontis Erneston dum la dua Renkontiĝo de Esperanto-Familioj (REF) en Žilina en 1981. Li kun Ĵuĵa iniciatis tiujn renkontiĝojn unu jaron pli frue kaj organizis ĝin enhave. Estis neforgesebla travivaĵo: Mi venigis mian 3-jaran Maja kaj 1-jaran Danka. Ili tre ĝuis la aranĝon. Kaj tiel la REFoj iĝis neevitebla enhavo de edukado de miaj filinoj. Nepre ni ne povis manki. Kaj eĉ ni organizis du el ili.

Enhave REFoj estis kreaĵo de Csiszaroj kaj estis unikaj. Ĉiu familio loĝis aparte – oni ne disigis infanojn de gepatroj. Tio estis gravega por bona sento de etaj infanoj kaj sento de sekureco en sia familio dum unuaj tagoj,

diference ekz. de Infanaj Kongresetoj. Krome, devis esti ĉiuj familianoj kun bona rego de la lingvo kaj la infanoj de 2-jaroj ĝis 15 estis akceptataj. La taga programo estis komuna en kiu partoprenis kaj gepatroj kaj infanoj. Iom da programoj estis apartaj ĉar al REF-oj la oranizantoj: familio Csiszar invitis ankaŭ kelkajn fakulojn: foje fakulon pri dancoj, foje pri kantoj, foje pri iuj ludoj aŭ iun instruiston de desegnado... Tiam la infanoj havis gvidanton kaj la gepatroj havis apartajn sesiojn: diskutojn pri dulingva edukado, spertoj, problemoj...



Sed plej kutime la programojn kreis la gepatroj mem. Ĉiutage iuj el gepatroj proponis iun programon el sia edukstoko kaj tial la programo estis daŭre varia kaj interesa.

Dank' al enorma energio kaj kredo de la gepatroj Csiszar, ke familio estas esenco de la homara estonto kaj ke edukado en kiu la infanoj kunvivas kun samaĝuloj el tre diversaj landoj kaj eĉ kontinentoj, lernas reciproke ludi (interŝanĝi ludojn), lernas kanti kantojn de aliaj, danci kaj kreadi, sendube kondukos al rezulto ke tiuj infanoj iĝos humanistoj kaj intelektuloj gravaj por la postaj propraj infanoj kaj ankaŭ por la mondo.

Ĵuĵa estis pedagogo kaj energia sed kvieta kaj ridetanta kreanto de enhavoj kaj Ernesto estis organizanto, ĉiam senlaca, ĉiam trovanta bonajn solvojn kaj plaĉajn celojn. Aparte li zorgis pri korpa ekzercado kaj aktivecoj.

Inter 40 kaj 50 familioj el preskaŭ 20 landoj amis REFojn kiujn iniciatis kaj gvidis Ernesto kaj Ĵuĵa dum pli ol 15 jaroj. Kaj dank' al la tre demokratia maniero gvidi REFojn, tiuj gravaj aranĝoj por praktika fortigo de Esperanto ĉe denaskaj esperantistetoj plu ekzistis ankaŭ kiam Csiszaroj ne plu okupiĝis pri ili, kiam iliaj filinoj Nora kaj Palma kreskis kaj ne plu apartenis al la aĝo REFa. Kaj la REFoj samsukcese pludaŭras nun en la spirito de Csiszaroj. Por la E-movado la tiel nomataj denaskuloj estas ege grava parto de la esperantista socio, fenomeno kiu la Movadon igas konvinka kaj la lingvon metas je nivelo de normalaj vivantaj lingvoj. Ĵuĵa kaj Ernesto havas por la Movado historie neelviŝeblan rolon.



Ĵuĵa mortis jam en 2001 kaj de tiam Ernesto malaktiviĝis en la E-movado. Ambaŭ estis entombigitaj en eta sudhungara vilaĝo Szalafő, kie ili havis bieneton tre ŝatatan. Mi dankas al ili ankaŭ persone pro netaksebla graveco de ilia agado por eduko de miaj filinoj. Tiu eduko sen REFoj sendube estus esence alia kaj nekompareble malpli riĉa.

Palma, Maja kaj Nora

Verkis: Zlatko Tišljarić - Pajo

INTERLINGVISTIKAJ STUDIOJ KAJ INTERLINGVISTIKA SIMPOZIO EN POZNANO

INTERLINGVISTIKAJ STUDIOJ de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) iĝas 20-jaraj, kion oni festos dum ĝia **4-a Interlingvistika Simpozio** en septembro (21-22, tuj post la unua sesio de la nova interlingvistika grupo kaj antaŭ la kultura festivalo Arkones), kun speciala sekcio dediĉita al **Zamenhof**, kaj malfermita al la ĝenerala publiko (problemoj de internacia komunikado).

Jen la informoj troveblaj en la retejo de la Studoj: <http://www.amu.edu.pl/~interl/>

4-A INTERLINGVISTIKA SIMPOZIO EN UAM

La Interlingvistikaj Studoj (Lingvistika Instituto, Novfilologia Fakultato, Adam Mickiewicz Universitato en Poznano, Pollando) organizas sian kvaran internacian interlingvistikan simpozion inter 21-22.09.2017 en Poznano. La ĉefa temo: Rolo de internaciaj lingvoj ekde la epoko de Zamenhof ĝis la nuntempa multkultura mondo.

Ilona Koutny

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

KULTUR-ESPERANTA FESTIALA KURSO EN SVEDUJO

Bonvenon al baldaŭa Kultura Esperanto-Festivalo-Kurso en Esperanto-Gården, Lesjöfors, Svedujo. Detalojn legu sur la paĝaro:

<http://esperantosverige.se/eg-kommande-handelser/951-kulturakurso>

Disvastigu inter viaj konatoj kiujn interesas Esperanto kaj kulturo!

Martin Strid

LA 3A INTERNACIA SIMPOZIO EN VROCLAVO (POLLANDO) PRUVAS FUNKCIADON DE ESPERANTO



La 19an de majo 2017 en Vroclavo en la salono de J. Czekanowski en Collegium Anthropologicum de Vroclava Universitato okazis dulingva altnivela simpozio. La 3a Internacia Simpozio preparis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado kune kun Jolanta Małecka-Juchymiuk (emerita lekciistino de Vroclava Universitato).

La Honoraj Patronoj de la simpozio estis Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino, Universala Esperanto Asocio, L M Rektoro de la Vroclava

Universitato prof. dr hab. Adam Jezierski kaj dr Ludoviko Zaleski-Zamenhof.

En la malferma ceremonio bonvenigon donis la L M Rektoro de la Vroclava Universitato prof. dr hab. Adam Jezierski kune kun Małgosia Komarnicka, la reprezentanino de la organizantoj. Poste salutvortojn prezentis reprezentantoj de du honoraj patronoj de la simpozio. Por AIS prof. Reinhard Fössmeier laŭlegis saluton de Amri Wandel, la prezidanto de AIS kaj por UEA salutis ĝia vicprezidanto Stefan MacGill.

Ĉi-jare la simpozio konsistis el du partoj. La unua estis dediĉita al la lingvo Esperanto “Kiel kreskis Esperanto kune kun ĝia kreinto“ kaj la alia al Vroclavo “Vroclavo – Eŭropa Ĉefurbo de Kulturo“.

En la unua parto de la simpozio esperantistoj proksimigis al la publiko informojn pri la historio de la lingvo Esperanto kun etleciono (Małgosia Komarnicka), pri rolo de denaskaj esperantistoj (Stefan MacGill), pri poezio kaj literature en Esperanto (dr Lidia Ligęza) kaj pri ebleco de eduki en Esperanto en AIS San Marino (prof. Reinhard Fössmeier).

En la dua parto de la simpozio famaj profesoroj de Vroclava Universitato prelegis pri ekumena Vroclavo (prof. Adam Jezierski), pri Eŭropo en la pola (prof. Jan Miodek), pri pentraĵo de Cranachoj (prof. Piotr Oszczanowski + direktoro de Nacia Muzeo en Vroclavo), pri teatra vivo en Vroclavo (prof. Janusz Degler + Kabineto en Teatra Muzeo) kaj pri muziko en Vroclavo (dr hab. Joanna Subel + Muzika Akademio).

La simpozion resumis Barbara Despiney, dr hab. Universite Paris 1 Pantheon-Sorbonne (Francio) kaj poste L M Rektoro de la Vroclava Universitato prof. dr hab. Adam Jezierski gvidis nin al la Universitata Muzeo. En la baroka aŭlo Oratorium Marianum li ludis orgenon, kiu estis konstruita en la jaro 1718 de organmajstro Adam Honorato Casparini admirigante per ĝia akustiko. Ĉi tiun tagon finis solena vespermanĝo en la restoraio „U Hrabiego” (Ĉe Grafo) en Ossolineum, kiu ĉi-jare festas 200 jarojn de ekesto.



Antaŭ komenco de la 3a Internacia Simpozio en *Przegląd Uniwersytecki* aperis la artikolo de Małgosia Komarnicka, en kiu la aŭtorino prezentis 130an datrevenon de la historio de la lingvo Esperanto kaj informojn pri 100a mortodatreveno de la Esperanto-kreinto Ludoviko Zamenhof sub la aŭspicio de UNESCO. Sekva artikolo pri la simpozio aperos baldaŭ ankaŭ en *Przegląd Uniwersytecki*, kiun ricevas profesoroj (ankaŭ emeritaj), universitataj oficistoj kaj studentoj.

Aŭskultante prelegojn, tradukojn kaj babiladojn dum kaj post la simpozio oni povis konvinkiĝi, ke Esperanto bonege funkcias kaj scipovas transdoni ĉiaspecajn nuancojn de homa penso, eĉ la plej malfacilan aŭ la plej mirigan esprimojn. Ĝi havas propran literaturon kaj oni povas en Ĝi klerigi akirante sciencajn rangojn.

Małgosia Komarnicka

PORTUGALA ESPERANTO-ASOCIO HAVAS NOVAN SIDEJON

PEA translokiĝis al nova sidejo. Lokaj vizitoj kaj papera poŝto iru al:

Portugala Esperanto-Asocio /
Associação Portuguesa de Esperanto
Praceta Humberto Delgado, 1B
Monte Abraão
PT-2745-318 Queluz SNT

La geografia pozicio de la nova ejo estas 38,7660688; -9,2586327.

B.v. ne plu uzi la malnovan adreson (Rua Dr. João Couto, 6-r/c A;
PT-1500-234 Lisboa).

António MARTINS-Tuválkin,
estrara sekretario de Portugala Esperanto-Asocio

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de junio 2017

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Vytenis Andriukaitis, Ulrich Brandenburg, Seán Ó Riain, Alois Eder, Manfred Westermayer, La Ondo de Esperanto, Dennis Keefe, Martin Strid, Ilona Koutny, Małgosia Komarnicka, António Martins-Tuválkin.

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

